

Tĕĥnikisto Ludvĭk Oĉenášek (1872 – 1949) kaj lia neostenta patriotismo

Oldřich Arnořt Fischer

Prelego por Esperantista Klubo Brno, la 13an de marto 2024

En nuntempa Ĉeĥa Respubliko oni preskaŭ ĉesis akcenti edukadon de junularo al patriotismo. Ofte oni la vorton patrioto ironizas, eĉ mokas. **Ĉu la patriotismo estas senenhava parolaĉado, skandado de sloganoj, svingado flagaĉojn kaj netoleremo al aliaj nacioj kaj eksterlandanoj?**

Tute ne!

Ekzemplo de ĉeĥa tĕĥnikisto Ludvĭk Oĉenášek, kiu estis agema kaj disciplinita membro de sporta organizo Sokol kaj partoprenanto en kontraŭhabsburga kaj kontraŭnazia rezistaj movadoj, eblas observi pozitivan influon de patriotismo sur konduton de talentita homo, laborema kaj persista entreprenanto kaj inventinto, kiu spite de malfavoraj kondiĉoj progresis de riparadoj de pluvombreloj kaj bicikloj ĝis sukcesaj eksperimentoj kun raketoj kaj eĉ okupis sian lokon en **Halo de Famo de Pionieroj de Kosmoflugoj en Usono**.

Junagŭo

Ludvĭk Oĉenášek naskiĝis **la 4an de aŭgusto 1872** en bohemia vilaĝo Křĩše (Bohemio, Distrikto Rokycany). Lia patro estis ministro en minejoj de alunaj ardezoj kaj fera erco. Lia patrino apartenis al parencoj de ĉeĥa lingvisto Josef Jungmann. En Křĩše naskiĝis ankaŭ lia pli aĝa frato Augustin Oĉenášek (1871) kaj pli juna fratinetino Marie, kiu vivis neplenajn tri monatojn.

Familio kelkfoje translokiĝis (setlejo Berk, solejo Malenice). En la jaro 1881 naskiĝis fratino Ida kaj en la jaro 1885 frato Josef.

Por Ludvĭk havis grandan signifon baza lernejo en Dolnĩ Bělá, kie li, same kiel hejme, sentis patriotan etoson. Vere li havis tĕĥnikan talenton, ĉar jam kiel lernanto de la 3a klaso li konstruis karuselon por siaj samklasanoj.

En la jaro 1886 Ludvĭk foriris en Pragon, kie li en firmao D-ro Houdek kaj Hervert lernis meĥanikon. En la jaro 1888 Ludvĭk ekstudis en **Imperiestra-Reĝa Ŝtata Tĕĥnologia Mezlernejo**.

Jam kiel studento li eksciis signifon de reklamo, pro tio li jam en la jaroj 1892-1893 ofertis instalaĵon de telefonoj kaj telegrafoj, vendis kaj riparis biciklojn, fotilojn, pluvombrelojn ktp.

Sokolanoj

Post la jaro 1848, kiam Habsburgoj subpremis pragan revolucion, homoj ne kredis al politikistoj kaj ne volis fari grandan politikon. Pro tio ili okupiĝis nur pri malgrandaj aferoj, por kiuj ili politikistojn ne bezonis. Unu el agadoj estis fondo de gimnastika societo Sokol (Falko).

Fondintoj de Sokol estis du.

Miroslav Tyrř devenis el familio de kuracisto, sed baldaŭ perdis siajn gepatrojn kaj gefratojn. Krom tio li ne estis altstatura (156 cm). Li estis edukita (doktoro de filozofio), sed suferis de depresioj. Pro tio li okupiĝis pri gimnastiko.

Lia amiko **Jindřich Fŭgner** estis germana komercanto kaj entreprenanto, kiu inklinis al ĉeĥa nacio, ellernis ĉeĥan lingvon kaj fariĝis mecenato kaj la unua prezidanto de la socio. Ideoj de Tyrř kaj financa subteno de Fŭgner fariĝis fundamento de sporta societo, en kiu ĉiuj estis fratoj kaj fratinoj.

Sokolan blazonon – bildo de falko kun slogano *Tuřme se!* (Ni plifortiĝu!) desegnis ĉeĥa pentristo Josef Mánas.

Sokolanoj al aŭstro-hungara polico ne plaĉis, ĉar ili havis duonarmean trejnadon. Tyrř kaj Fŭgner sinofereme laboris por sokola societo, kiu fariĝis fama kaj ŝatata. Sed krom viroj, kiuj volis okupiĝi pri gimnastiko, alvenis ankaŭ ĉeĥaj nacionalistoj, kiuj volis krei de Sokol politikan organizon, kaj „paradanoj“, t. e. membroj, kiuj pagis membrajn kotizojn, sed ne volis ekzerci. Ili ŝatis porti sokolajn kostumojn, marŝi sub flagoj, drinki, provoki germanojn kaj policianojn.

Kvazaŭpatriotismo de ĉefaj nacionalistoj kaj primitivaj „paradanoj“ kaŭzis al Tyrš kaj Fügner multe da problemoj.

Sub influo de Tyrš komencis ekzerci ankaŭ virinoj sub la gvido de Klemeňa Hanušová.

Mi volas substreki, ke Ludvík Očenášek ĉiam estis disciplinita sokolano.

Sokolaj agadoj

Augustin Očenášek, pli aĝa frato de Ludvík, fariĝis sokola peranto kaj en la jaroj 1910 – 1913 kaj 1919 – 1928 li estis sokola distriktestro de Centra Bohemio.

Ankaŭ Ludvík restis fidela al sokola ideo dum tuta vivo. Li ageme kaj sukcese sportis.

En fino de junio 1902 li kun sia pli aĝa frato partoprenis en ekskurso de sokoloj en Francion (Le Mans).

En la jaro 1907 lia firmao fabrikis 15 milojn da insignoj por La 5a Tutsokola Kunflugo, kiu okazis en Prago.

Kiel la insigno aspektas? Falko tenas manhalteron kaj ĉefa slogano estas „**En penso vi havu patrujon - en koro vi havu kuraĝon - en brako vi havu forton!**“

Sokolano Ludvík kapablis kuri 200 m por 24,6 sekundoj (ĉeĥa rekordo de la jaro 2013 estas 20,48 sekundoj). Alia informo: li kapablis 35-foje suprenlevi mangiron, kiu pezis 35 kg.

Sed Ludvík estis precipe talentita tehnikisto. Granda problemo de sportaj stadionoj estis sonigo de stadionoj, kie sokolanoj ekzercis. En la jaro 1938, antaŭ la 10a Tutsokola Kunflugo, Ludvík kun sia filo kreis sistemon de 24 subteraj mikrofonoj. Same li en la jaro 1948 sonigis la 11an Tutsokolan Kunflugon.

Armea servo kaj geedziĝo

En la jaroj 1894-1896 Ludvík Očenášek servis en armeo en bohemia urbo Písek, sed armea servo al li ne plaĉis. Li havis multe da konfliktoj kun oficiroj kaj kiam li por sia preciza pafado ricevis memoran moneron kun portreto de imperiestro, li uzis ĝin por aĉeto de kolbaso. Ankaŭ li estis fotita en uniformo, sed dum fotado en siaj manoj li tenis poemaron de Svatopluk Čech „Kantoj de Sklavo“ („*Písně otroka*“).

Sed en Písek li trovis sian fianĉinon. Pavlína Tašnerová estis filino de ŝuista majstro. Geedziĝo okazis la 14an de novembro 1897. Geedzoj havis tri infanojn (Miroslav, 1898, Milada, 1900, Ludvík, 1907), sed geedzoj unu la alian ne komprenis, verŝajne pro psiĥika labileco de Pavlína.

Ekde la jaro 1899 familio loĝis en Prago.

En la jaro 1903 Ludvík aĉetis motociklon kun flanka kromĉaro. Kiam li kun Pavlína faris ekskurson (Prago – Písek), li koncentriĝis nur pri stirado kaj ekĝojis, ke lia motociklo havas pli bonan povon. Nur post iu tempo li eksciis, ke li la kromĉaron kun Pavlína perdis.

Reveno al entreprenado

En la jaroj 1896 – 1899 Ludvík Očenášek laboris en patentita oficejo de inĝ-ro Ladislav Vojáček, kie li pruvis sian kapablecon pere de konstruado de meĥanikaj maŝinoj, riparado kaj fabrikado de skribmaŝinoj, elektraj motoroj kaj bicikloj.

En la jaro 1898 li ekkonceptis kaj en la jaro 1903 li jam riparis 50 aŭtomobilojn. Laŭ dokumentoj el la jaro 1906 oni scias, ke lia firmao kreskis sub la nomo **Elektroteĥnika Fabriko kaj Maŝinfabriko de Ludvík Očenášek**. En la jaro 1908 en la firmao laboris ĉirkaŭ unu cento da laboristoj kaj kelkaj oficistoj. La firmao kreis unu ekzempleron de balaa maŝino, kiun eltrovis František Vysloužil. Pli malfacila estis konstruado de elektraj centraloj en Kutná Hora, Počátky, Pelhřimov kaj Stádlc. En konstruata frenezulejo en Bohnice la firmao faris „ĉiujn elektrajn laborojn“. Bedaŭrinde en la jaro 1914 la firmao bankruptis.

Bicikloj kaj unuciklo

En la 70aj jaroj de la 19a jarcento en Landoj de Ĉeĥa Krono (Bohemio kaj Moravio) ekprogresis amasa biciklado. Pro tio oni importis diversajn tipojn de bicikloj.

Ludvík Očenášek konstruis propran biciklon, kiu havis grandan antaŭan radon kaj malgrandan malantaŭan radon. Oni tion nomigis osto-ŝancelilo (laŭ angla *bone-shaker*, ĉeĥlingve *kostitřas*). Li faris ekskurson en sian naskan vilaĝon Kříše. Kiam li iris tra vilaĝo Dražeň, li iris suben el monteto kaj ekvidis, ke kontraŭ li iras funebra procesio. Sur sia tipo de biciklo li ne kapablis facile bremsi. Pro tio li tra pordego eniris en korton de iu bieno kaj falis en sterkon. Malantaŭa radeto de lia biciklo lin subenpresis en stalan urinaĵon.

Por fabrikado de bicikloj li serĉis lernoknabon.

Sed lia plej interesa agado estis eltrovo de **unuciklo**, kiun li en la jaro 1898 patentigis. Li opiniis, ke avantaĝo de unuciklo estas tiu, ke ĝi pli facile ol normala biciklo iras tra terenfalaj kaj malglataĵoj. Sed provoj de unusola ekzemplero montris, ke irado sur la unuciklo estas danĝera. Foto de la unuciklo ne ekzistas, nur reklama afiŝo restis. Oni eĉ dubas, ĉu Očenášek fabrikis pli ol unu ekzemplero de la unuciklo.

Arka lampo

Fabrikado de elektraj lampoj eblis nur post eltrovo de dinamo, kiu el meĥanika energio kreis elektran energion (kurenton).

En la jaroj 1866 – 1867 la dinamon preskaŭ samtempe eltrovis Ernst Werner von Siemens, Charles Wheatstone kaj Samuel Alfred Varley. Sed konatajn arkajn lampojn oni ne povis uzadi en lampaj cirkloj (lamparoj), ĉar ĉiu lampo bezonis sian propran fonton de la kurento kaj tio estis multtekosta.

En la jaro 1877 la problemon solvis ruso Pavel Nikolajeviĉ Jabloĉkov, kiu eltrovis kaj en Francio patentigis tiel nomatan Kandelon de Jabloĉkov. Bedaŭrinde, se en cirklo unu lampo estingiĝis, ankaŭ ĉiuj aliaj lampoj de la cirklo estingiĝis.

En la jaro 1878 Friedrich von Hefner-Alteneck la problemon solvis. En Bohemio tiun pliperfektigon uzis František Křížik.

Krom Křížik en Bohemio la lampojn pliperfektigis ankaŭ inĝ-ro František Janeček (fondinto de fama motocikla fabriko JAWA, kies nomo devenas el la nomoj Janeček kaj Wanderer) kaj Ludvík Očenášek.

Fabrikado de arkaj lampoj estis unu el grandaj komercaj sukcesoj de Očenášek, kiu siajn arkajn lampojn lanĉis en Pollando kaj Ruslando.

En la 20aj jaroj homoj ekuzis pli malgrandajn ampolojn kaj pro tio erao de arkaj lampoj finis.

Okcilindra motoro

Verŝajne Ludvík Očenášek origine volis la motoron uzi en aŭtomobilo, sed poste ankaŭ en aviadilo. Li ĝin ekkonstruis en la jaro 1905 kaj patentigis en la jaroj 1907 kaj 1908 (du patentoj). Li pezis 75 – 80 kg kaj havis povon 14 – 16 ĉevalforton (10,3 – 11,8 kW – laŭ datoj el diversaj fontoj). Fuelo estis benzino kaj malvarmigado estis aera. Sed kutime aviadilaj rotaciaj motoroj havas neparan nombron de cilindroj kaj motoro de Očenášek havis ok cilindrojn. En aŭtomobiloj oni uzadis rotaciajn motorojn nur malofte. Krom tio fabrikado de tiu ĉi motoro estus multtekosta. Pro tio la motoro de Očenášek estis uzata nek en aŭtomobiloj nek en aviadiloj.

Ekspozicio en Ĉenstoĥova en la jaro 1909

Ekspozicio en pola urbo Ĉenstoĥova (*Częstochowa*, 5 aŭgusto – 3 oktobro 1909) ne estis nur la ekspozicio de produktoj de diversaj firmaoj, sed havis ankaŭ novslavan etoson. **Novslavismo** estas ideo de egaleco de ĉiuj slavaj nacioj. Tio ne plaĉis al rusoj, kiuj volas regi super slavaj nacioj.

Ludvík Očenášek estis unusola eksterlanda partoprenanto, kiu tie estis honorigita. Li ricevis oran medalon siaj por rotacia motoro kaj flama lampo.

Aviadiloj

Antaŭ la unua mondmilito en Bohemio kaj Moravio oni faris unu centon da eksperimentoj kun aviadiloj, sed nur kelkaj eksperimentoj estis sukcesaj.

En la jaro 1909 el Velká Chuchle ekflugis biplano de fratoj Wright, kiun pilotis franco Louis Gaubert.

En la jaro 1910 en Pardubice ekflugis franca unuplano Blériot XI, kies piloto estis ĉeĥo, inĝ-ro Jan Kašpar.

En novembro 1909 volis fari eksperimentojn kun aviadiloj Ludvík Očenášek kaj inĝ-ro Otto Hieronymus, ĉefa konstrukciisto de firmao Laurin & Klement (nuntempa Škoda).

En februaro 1910 Očenášek en praga Palaco Lucerna ekspoziciis modelon kaj kelkajn fabrikatajn partojn de sia aviadilo. En julio 1910 Očenášek montris al ĵurnalistoj sian unuplanan aviadilon. Ĝi longis 13 m kaj havis spanon de flugiloj 12 m. Helico longis 280 cm. Benzina sepcilindra motoro Gnome havis povon 50 ĉevalfortoj. Pezo de la aviadilo kun piloto, 75 kg da benzino kaj 8 kg da oleo estis ĉirkaŭ 500 kg. La 27an de novembro 1910 Očenášek flugis 30 m. Fakte tio estis ne flugo, sed nur unu longa salto antaŭen.

La 19an de oktobro 1912 dum provo de motoro la aviadilo ekflamis kaj forbrulis. Očenášek donacis la motoron el ruino de sia aviadilo al ĉeĥa piloto Eugen Čihák.

Maffia

Dum la unua mondmilito Ludvík Očenášek fariĝis kontraŭhabsburga rezistanto. Kaŝa organizo Maffia volis sendependecon de Bohemio kaj Moravio. En marto 1915 Očenášek finis sian modelon de aera torpedo. Tio estis minĵetilo. Tehnikaj dokumentoj de la minĵetilo estis trans Svisio kaŝe senditaj en Francion. Tomáš Garrigue Masaryk donacis dokumentojn pri la minĵetilo al franca prezidento. La minĵetiloj estis uzataj en franca kaj itala frontoj.

Danĝera situacio okazis, kiam Očenášek estis malliberigita, ĉar li timis, ke policianoj trovos liajn planojn de la minĵetilo. Unu ebria oficiro denunciis, ke li, verkistino kaj la unua ĉeĥa ĵurnalistino Olga Fastrová kaj kelkaj aliaj homoj, malrapide ekstaris, kiam en gastejo oni ludis monarĥian himnon. Bonŝance la polico la planojn ne trovis kaj Očenášek-on baldaŭ liberigis.

En la jaro 1918 Očenášek trovis telefonan lineon inter germana kaj aŭstra ministerioj de defendo. En praga setlejo Demartinka li kreis kaŝitan subaŭskultejon, kie li sukcese subaŭskultis telefonadojn de ministerioj de defendo de ambaŭ ŝtatoj kaj transdonis informoj al rezistaranoj. Li ankaŭ perturbis telefonajn parolojn inter Berlino kaj Vieno.

Unua respubliko

Post la unua mondmilito Ludvík Očenášek verkis sian libron Por Helpo al la Triopa Entento (*Na pomoc Dohodě*, 1919). Reĝisoro Gabriel Hart kreis ankaŭ samnoman filmon (1919), sed tiu filmo malaperis. En la jaro 1928 la libro estis denove eldonita.

La 11an de novembro 1925 prezidento Masaryk membrojn de Maffia, inter ili ankaŭ Očenášek-on, honorigis per Ĉeĥoslovakia Revolucia Medalo.

Očenášek denove ekfabrikis diversajn utilajn aĵojn: kuirplatojn, mergboligilojn, sekigilojn de hararo kaj radiojn.

Raketoj

Ludvík Očenášek laboris pri konstruado de raketoj kia filo Miroslav, kiu jam estis inĝeniero. Ili ne volis flugi en Marson, sed ilia celo estis raketoj por scienca aŭ iluminada uzoj. Jam la 20an de januaro 1930 ĵurnaloj informis, ke Očenášek suprenpafis siajn raketĵojn ĝis altitudo 200 m. La 2an de marto 1930 apud Bílá hora ekflugis du duonmetraj raketoj, kiuj pezis 2 kg, kaj du raketoj, kiuj pezis ĉirkaŭ 5 kg. Malgradaj raketoj akiris altecon 1 km. Sed tio estis lastaj eksperimentoj de Ludvík Očenášek kaj lia filo.

En la sama tempo faris siajn eksperimentojn Vladimír Mandl, kiu sian raketon patentigis la 25an de septembro 1935. Očenášek kaj Mandl estis unusoj ĉeĥoj, kies nomoj estas en Halo de Famo de Pionieroj de Kosmoflugoj en Usono.

Ĉeĥa romano en stilo de Jules Verne

Ludvík Očenášek estis ankaŭ aŭtoro de antaŭparolo de aventura libro de Jan Otto Parma „Elpafo en Universon“ („*Výstřel do vesmíru*“). Heroo de la romano, ĉeĥa inĝeniero Ivan Horáček flugas en ĉeĥa raketo Slavia savi alian raketon. La raketo Slavia havis ĉeĥan raketanaron kaj teĥnike similas al veraj raketoj, kiuj post pli ol 30 jaroj sukcese transportis homojn en universon.

Laboristo de koncerno Baťa

Ludvík Očenášek denove bankruptis kaj pro tio li en la jaro 1933 eklaboris ĉirkaŭ 4 monatojn en firmao Baťa en moravia urbo Zlín. Li estis jam 65-jara, pro tio li en la firmao Baťa malfacile adaptiĝis. Lia tasko estis konstruado de komercaj aŭtomatoj por vendado de ŝuoj kaj ŝuciroj. Li havis bonan salajron (500 ĉeĥoslovakaj kronoj por semajno), sed en la fabriko al li ne plaĉis.

Hidrodinamika boato

Ludvík Očenášek kaj lia filo Miroslav, kiu fariĝis inĝeniero, ekkonstruis hidrodinamikan boaton en la jaro 1928, sed prezentis ĝin al publiko en decembro 1932.

La 12an de julio 1932 Tomáš Baťa mortis kaŭze de aviadila akcidento. Li kaj lia posteŭlo Jan Antonín Baťa subtenis konstruadon de kanalo Elbo-Morava-Danubo, sed ĝis fino de la konstruado ili ne povis ŝipan transporton de siaj produktoj en Bratislavon lanĉi. Očenášek jam en la firmao Baťa ne laboris, sed volis fini siajn eksperimentojn el la jaro 1932. Provo de nova boato okazis en Prago la 19an de aŭgusto 1933.

Hidrodinamika boato havas nek ŝiphelicon nek stirilon. Ĝi en antaŭa flanko ĉerpas akvon, kiun el du kanaloj elŝprucas. Reakcia forto la boaton movigas antaŭen.

La boato longis 12,5 m, larĝis 2,6 m, pezis 800 kg kaj por 50 km bezonis nur 3 litrojn de benzino kaj duonon da litro de motora oleo. Povo de motoro estis 80 ĉevalfortoj (58,8 kW) kaj rapideco estis 25 km/horo. Kun ŝarĝo 2 t mergiĝa profundo de la boato estis nur 25 cm.

Pli bona versio de la boato sub la nomo Orlík estis finita en oktobro 1933. Očenášek vendis nur unu ekzempleron por ĉeĥoslovaka armeo.

Lia filo kvar motorojn de Očenášek instalis en boatojn de pola armeo.

Očenášek laboris ankaŭ dum la dua mondmilito. Li konstruis aŭtomatojn por dozado de medikamentoj. Post la milito la aŭtomatojn uzadis ĉeĥoslovaka farmacia industrio.

Senbrua mitralo

En la jaroj 1934 – 1936 Očenášek inventis senbruan mitralon, sed la patento numero 79515 estis akceptita nur post lia morto, la 15an de septembro 1950.

Fino de vivo

Dum germana okupado Ludvík Očenášek ne volis kunlabori kun germana esploristo Hermann Oberth pri konstruado de raketoj V-1 kaj V-2. Gestapo lin suspektis, kiel ebla malamiko, pro tio li ne povis rekte partopreni en kontraŭnazia rezistado. Sed li dufoje helpis al malliberigitaj homoj. Li partoprenis en Praga Popolleviĝo kaj la 8an de majo 1945 li estis vundita de germanaj soldatoj.

Post resaniĝo Očenášek kontinuis sian laboron. La 31an de aŭgusto 1945 li prezentis maŝinon por kalkulado kaj pakado de tablojdoj.

La 21an de aprilo 1949 li ricevis premiojn por du maŝinoj por kalkulado kaj pakado de tablojdoj kaj skatoleton por ŝmiraĵoj.

La 10an de aŭgusto 1949 li forpasis en vilaĝo Dražev.

Rekomendita literaturo

BUDIL, I. 1989: O muži, který se neuměl vzdát. Portrét vynálezce Ludvíka Očenáška (1872 – 1949). In: Ročenka Technického magazínu 3. Prago, Státní nakladatelství technické literatury, 172-182.

CIMRMAN, J., SMOLJAK, L. & SVĚŘÁK, Z. 1993: Dobyetí severního pólu Čechem Karlem Němcem 5. dubna 1909. 1a eld., Prago, Paseka, 74 paĝoj.

- CIMRMAN, J., SMOLJAK, L. & SVĚRÁK, Z. 2009: České nebe. 1a. vyd., Prago kaj Litomyšl, Ladislav Horáček - Paseka, 71 paĝoj.
- DVOŘÁKOVÁ, Z. 1989: Miroslav Tyrš – prohry a vítězství. 1a. vyd., Prago, Olympia, 224 paĝoj.
- FRANCOVÁ, M., KOŠUTOVÁ, K., VOŘECHOVSKÁ, P. & NEDOMOVÁ, B. 2013: Věda, vědci, vynálezci z Plzně – L. Očenášek, J. Skála, A. E. Dobner, E. Škoda. 1a. vyd., Plzeň, Ateliér Komiks a ilustrace pro děti, Ústav umění a designu, Západočeská univerzita, 52 paĝoj.
- HAŠEK, J. 2003: Politické a sociální dějiny Strany mírného pokroku v mezích zákona. 1a. vyd., Prago, Levné Knihy KMa, 314 52 paĝoj.
- HORA-HOŘEJŠ, P. 2000: Toulky českou minulostí, 1a. 8a. volume. 1a. vyd., Prago, Via Facti, 222 paĝoj.
- HORA-HOŘEJŠ, P. 2007: Toulky českou minulostí, 1a. 11a. volume. 1a. vyd., Prago, Via Facti, 222 paĝoj.
- JEŽEK, M. 2017: Geniální vynálezce ze západočeské visky: Ludvík Očenášek. <https://temata.rozhlas.cz/genialni-vynalezce...> 2017-08-04.
- MANDL, V. 1932: Das Weltraum Recht. Ein Problem der Raumfahrt. 1a. vyd., Mannheim, Berlin, Leipzig, J. Bensheimer Verlag, 48 paĝoj.
- NACHTMANN, L. 1998: Ludvík Očenášek (1872 – 1949), český technik a vynálezce. Dějiny věd a techniky 3: 145-155.
- NACHTMANN, L. 1999: Český technik ve 20. století. Ludvík Očenášek (1872 – 1949). Časopis národního muzea. Řada historická 1-2: 55-71.
- PETRUS, J. 1937: A vyšel rozsevač. Život dr. Miroslava Tyrše, zakladatele Sokola. 2a. vyd., Prago, Státní nakladatelství, 203 paĝoj.
- PLAVEC, M. 2017: Od jízdních kol ke kosmickým raketám. Ludvík Očenášek (1872 – 1949). 1a. vyd., Prago, národní technické muzeum, Město Plasy, 139 paĝoj.
- VACEK, Z. 2010: Vynálezce i hrdina. O rakety Ludvíka Očenáška se zajímali i Američané, zařadili ho do vesmírné dvorany slávy. <https://www.reflex.cz/clanek/causy/92376/vynalezce-i-hrdina...> 2016-08-10.

Personecoj

- Baťa, Jan Antonín (1898 – 1965)
- Baťa, Tomáš (1876 – 1932)
- Brodská Ida, fraŭlinnome Očenášková (1881 – 1948)
- Čech, Svatopluk (1846 – 1908)
- Čihák, Eugen (1885 – 1958)
- Fastrová, Olga (1876 – 1965)
- Fügner, Jindřich (1822 – 1865)
- Hanušová, Klemeňa (1845 – 1918)
- Hart, Gabriel (1894 – 1961)
- Hefner-Alteneck, Friedrich Heinrich Phillip Franz von (1845 – 1904)
- Hieronimus, Otto (1879 – 1922)
- Jabločkov, Pavel Nikolajevič (1847 – 1894)
- Janeček, František (1878 – 1941)
- Jungmann, Josef (1773 – 1847)
- Kašpar, Jan (1883 – 1927)
- Křížík, František (1847 – 1941)
- Mandl, Vladimír (1899 – 1941)
- Mánes, Josef (1820 – 1871)
- Masaryk Garrigue, Tomáš (1850 – 1937)
- Oberth, Hermann (1894 – 1989)
- Očenášek, Augustin (1871 – 1942)
- Očenášek, Ludvík (1872 – 1949)
- Očenášek, Miroslav (1898 – 1955)
- Očenášková, Pavlína, fraŭlinnome Tašnerová (1877 – 1967)
- Siemens, Ernst Werner von (1816 – 1892)
- Tyrš, Miroslav (1832 – 1884)
- Tyršová-Fügnerová, Renáta (1854 – 1927)
- Varley, Samuel Alfred (1832 – 1921)
- Wheatstone, Charles (1802 – 1875)